# *Díaz-Canel emfazas gravecon gajni la batalon kontra? dengo*



Havano,  sep 14 sep (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj Prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel, asertis ke ?ustatempa kuracado kaj preparo de kuracistoj estas esencaj por gajni la batalon kontra? dengo.

En sia Tviter-konto, la eminentulo emfazis la renkonti?on, kiun li okazigis kun esploristoj de la Instituto de Tropika Medicino Pedro Kourí (IPK) kaj fakuloj de la Ministerio pri Publika Sano (MINSAP) por taksi la epidemiologian situacion de la lando koncerne tiun malsanon.

Dum la kunveno, la kuba ?tatestro esprimis la gravecon por la ?ustatempa traktado de la malsanuloj, ne nur pri  lerteco de la kuracistoj kaj la preparado de la sanpersonaro komisiita prizorgi ilin, sed anka? pri la rapideco ser?i  kuracistan konsulton en ?eesto de simptomoj asociitaj kun la viruso.

Trejnado kaj kvalifiko en la klinika administrado de kuracistoj kaj flegistinoj, edukado de la lo?antaro, rilatante al moskitkontrolo, kaj anka? ke familioj kaj pacientoj havus bazan scion pri la simptomoj kaj avertosignoj kaj, sekve, iras al la sanaj servoj senprokraste, estis inter la ?efaj aspektoj levitaj, kiujn oni devas konsideri en la ?eesto de la viruso.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/299205-diaz-canel-emfazas-gravecon-gajni-la-batalon-kontrau-dengo

Radio Habana Cuba